3.ª JARO N.º 35 DUONMONATA ESPERANTO-GAZETO 1 APRILO 1938

# POPOLA FRONTO

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA
REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25 VALENCIA (Hispanio)

# NE GRAVAS NUN LA NUANCOJ DE PRIVATAJ IDEOJ!

La grado de sovaĝeco, kiun la perfidaj generaloj senbridigas sur Hispanio, ekvekus teruron se ne estiĝus koleron. Denove akiras kategorion je aktualeco la seka demando, kiun ofte ni laŭtigis: Ĉu tio estas la milito? Jes! sen ia dubo. Tio estas la milito, almenaŭ laŭ faŝista maniero; laŭ sistemo, kiun humile obeas la hispanoj submetitaj al fremdaj ŝtatoj por eksperimenti, sur karno de siaj samlandanoj, la efikon de modernaj mortigiloj, destinitaj al pli vastaj entreprenoj. Sed tio ja ne estas la plej abomena aspekto. Multe pli naŭzinda estas la fakto, ke Eŭropo toleras kviete k pasive tian skandalon, kvazaŭ la muĝo, kiu ondumas tra nia lando, ne estus avertanta aŭguro. El kia argilo konsistas la sentemo de tiuj, kiuj pretendas reprezenti, en la mondo, la esencojn de la Demokratio? Eĉ se ni ne estus protagonistoj de la tragedio; eĉ forgesinte pri nia hispaneco, la muteco k blindeco, antaŭ similaj krimoj, estus risorto por impulsigi nian justan indignon: Vilaĝoj detruitaj, bruligitaj, sen milita celo; centoj da miloj da infanoj k virinoj dispecigitaj; hospitaloj renversitaj, muzeoj profanitaj; homamasoj masakritaj dum apoteoza forkurado... Terure; jes, terure mirinde estas, ke fremdaj modernaj armeoj, konsistantaj el homoj, povas fari tion; sed terure nekredeble—kvankam vere—estas ke en tiu ĉi apokalipso intervenas k fanfaronas amaso da hispanoj, kiuj eble celas rikolti, kiel frukton de sia perfido, la kadavron de la nobla Hispanio. La cirkonstancoj devigas ripeti, multajn fojojn, la saman veron: Nia milito ne estas civila malakordo nek ideologia malkonsento. Nia lukto estas natura memdefendo. La faŝista venko signifus, por ĉiuj hispanoj, akiri staton de sklavoj; junaj generacioj devige fordonus sian vivon, sur fremdaj batalejoj, defendante la despotismon kontraŭ la libereco. En Hispanio ne kolizias honestaj, iele malsamaj, opinioj. La sango fluas, kiel preludo de antikva disputo pri la hegemonio, sur Eŭropo unue k sur la tuta mondo poste. Tial ne gravas nun la nuancoj de niaj privataj ideoj sociaj aŭ politikaj. Gravas ja nur definitive la intima k supera konsidero; la firma konvinko, ke la plej noblaj kvalitoj de la tuta homaro estas en danĝero, k defendante la Respublikon ni ankaŭ defendas, samtempe, la spiritajn trezorojn de la mondo. Kelkaj landoj, kiuj ankoraŭ konservas demokratajn privilegiojn, ne devas forgesi, ke se la fino de nia milito estus malfavora por la popolo, ili havus ĉe la dorso armeon el unu miliono da homoj, devigataj batali, pli aŭ malpli fervore, kontraŭ la nacioj al kiu ili fidis dum sia mirinda rezistado. Intertempe, la malamiko ricevas senĝene ĉion taŭgan por detrui, k oni malpermesas al ni akiri plej necesajn defendilojn. La helpantoj de nia malamiko estas despotoj, kiuj tute ne kalkulas pri siaj popoloj; sed la malhelpantoj de nia defendo estas ruzuloj—aŭ friponoj—kiuj devas bremsi, per sofismoj k mensogoj, la noblajn impulsojn de vasta civitanaro. Oni ĵonglas per frazoj; oni svingas la timigilon je danĝero de milito; oni pretendas ignori la malkaŝan intervenon de la milita forto de du potencaj ŝtatoj. Oni tordas la sincerajn intencojn de niaj postuloj, kvazaŭ la hispanoj volas egoisme, ke la francoj aŭ la angloj soldatiĝu por savi ilin. Ne; tute ne, milfoje ne! Tio estas kalumniego por devojigi la publikan atenton el la vera direkto, el la ĝusta politika formo. Oni ruze kovas tiamaniere la plej monstran perfidon al la modestaj amasoj, kiuj subite riskas perdi valorajn rajtojn, se ili tuj ne reagas aktive kontraŭ la farso de tiuj gvidantoj, kiuj ŝajnas koleri publike pro barbaraj bombardadoj, sed ili ja nur koleras intime pro nia obstina deziro nepre rezisti, ĝis venko aŭ pereo, por fiaskigi la planojn de Hitler k Mussolini, kiuj estante fanfaronaj mastroj de Franko, jam estas nun nenies sekreto ke ili samtempe estas humilaj grumoj de tiu Chamberlain, ŝarko, kun tubo-ĉapelo, de la angla kapitalismo!

## RAJDANTE SUR LA CIRKONSTANCOJ

La krudaj postuloj de la milito penetras eĉ en nia Redakcio. La reduktita nombro da restintaj prizorgantoj fariĝas pli malvasta. Nia gazeto, ankaŭ en tiu aspekto, estas pura spegulo de la hispanaj okazintaĵoj. En plenumo de sia devo, marŝas al la fronto kelkaj kamaradoj; aliaj pretiĝas okupi urĝajn postenojn, kiujn ili povas prizorgi, pro siaj fakaj spertaj kapabloj. Tamen, POPOLA FRONTO, vigla heroldo internacia de plej heroa batalo kontraŭ la tiranio, kunigas k streĉas siajn fortojn por ne perdi la kontakton kun tiu konscia amaso internacia—sentema medolo de la esperantista popolo—kiu tiel mirinde pruvas la vivpovon de ĉiu Esperanto-entrepreno, ekster oficialaj rondoj, ekster asociaj konkurencoj aŭ klubaj polemikoj, kiam oni aplikas la pozitivajn flankojn—kiuj estas, sen paradokso, la plej romantikaj—de nia lingvo por la tremantaj aktualaĵoj, tra suferoj k ĝojoj, de la vivo mem. La peza ŝarĝo kuŝas jam sur malmultaj ŝultroj, kiuj promesas, al ĉiuj legantoj k bonaj amikoj, labori ankoraŭ pli streĉe k ĉiel ajn zorgi, ke la bruna banderolo de nia gazeto, vizitonte vin ankoraŭ akurate, parolu al vi pri la fervoro de tiuj hispanoj, kiuj, per elĉerpiga klopodado, transformas viajn moneretojn en valoran dokumenton por la historio de la Esperanto-movado. Ni promesas labori sen paŭzo nek ripozo, laŭ eblo de niaj fortoj; ni estas pretaj fari aŭdacajn paŝojn por garantii la aperon de nia organo, laŭ eblo de nia povo, se la varmo de via solidareco, daŭras kiel ĝis nun...

**Kelkaj kamaradoj el nia Redakcio ĵus soldatiĝis. Aliaj eble baldaŭ devas sekvi la saman vojon, kiun postulas la nunaj cirkonstancoj. Kompreneble, tio efikos sur la normala marŝo de POPOLA FRONTO, kiu ne povos aperi tiel regule kiel ĝis nun. Tial ni esperas, ke vi scios pardoni la neeviteblajn akcidentojn de nia modesta entrepreno, kiu, pro sia karaktero, tute dependas de la zigzagaj fluoj de la milito mem**

# MOZAIKO

● La faŝista urbestro de Bilbao, per dekreto, ordonis ke la urbaj instruistoj estu vestitaj per jena uniformo: la viroj; nigra pantalono, blua ĉemizo, ruĝa ĉapo k nigra kartoĉujo. La virinoj; nigra jupo, blua bluzo k ruĝa ĉapo; ĉiuj kunportos la insignojn de Falango. Ĉio estas dekoracio!

● La faŝista gazeto *ABC* de Seviljo, parolante pri komploto kontraŭ la portugala diktatoro, diras jenon: «Inter la malbonaj komplikitaj portugalanoj, kiuj estas arestitaj, aperas la neeviteblaj intelektuloj: kuracistoj, inĝenieroj, verkistoj... Neniam mankas tiaj geniuloj!»

● Dum aera bombardado, la 9. de Marto, al vilaĝo Puebla de Hijar, la faŝistaj aviadiloj detruis la hospitalon, kie pereis 105 vunditoj.

● Nia ministro pri Nacia Defendo publikigis noton priskribante la grupojn da germanaj aviadiloj, kiuj alvenis lastatempe. Tiu aera organizo estas komandata de jenaj oficiroj: generalo Veidt; komandantoj: Neudorfer, Hermann, Scholtz, Ficher k Zielberg, k kapitano Schreder. Ĉiuj el ili apartenas al germana armeo.

● La itala gazeto *Il Popolo di Roma* anoncas, ke la generalo Bergonzoli, kiu komandis la divizion Littorio, estas vundita en kruro dum la aragona ofensivo. Tiu generalo, pli bone konata per la kromnomo «Elektra Barbo» estas anstataŭita de la generalo Frusci, el itala armeo.

● En angla parlamento Mr. Chamberlain diris, rilate al aeraj bombardadoj de Barcelono, ke neniu povas sciiĝi pri tio ne sentante naŭzon k abomenon. Malgraŭ tiu diraĵo, la italaj k germanaj aviadistoj daŭre bombardas niajn urbojn k vilaĝojn.

● La 10. de Marto alvenis, en nord-hispana haveno, pluraj kontingentoj da germanaj trupoj, kiuj konsistigas novajn motorigitajn sekciojn, grupojn de artilerio k antiaerajn defendilojn. Ĉiuj oficiroj apartenas al regula germana armeo.

● La 20. de Marto, en Barcelono, estis transportita al franca militŝipo, la kadavro de la franca vic-konsulo Mr. Antoine Lecouteaux, kiu estis viktimo de lasta bombardado de faŝista aviadilaro.

● La itala gazeto *Il Giornale d'Italia* sciigas ke, per Medalo de Arĝento k Milita Kuraĝo, estar ordenita Vittorio Rustici, tankisto kiu «mortis en la konkero de Malago sub la ordonoj de la veterana Appio-Komando».

● Interesaj sciigoj por la katolikoj: En Bilbao nun okazas milita juĝado kontraŭ la pastro de Algorta, Jozefo Arechederra k kontraŭ la parohestro de Las Arenas. La kapucenoj de najbaraj vilaĝoj estas ĵus ekzilitaj.

● La angla gazeto *Daily Herald* informas jene: «Soldatoj de la regula germana armeo okupis poziciojn vere strategiajn en la franca-hispana landlimo, ĉe la Pirineoj. Ili tute kontrolas la regionon de Irun ĝis la okcidenta parto de la Pirineoj. La germanoj ne kaŝas sian naciecon k surportas uniformon de la *Reichswehr*.

● La korespondanto en Asturio de angla gazeto *Times* sciigas, ke en Oviedo estas arestitaj 1144 laboristoj «sub akuzo de interveno en faktoj kontraŭaj al reĝimo de Franko».

● La 26. Marto, je 20 mejloj el hispana marbordo, trapasis sep komercŝipoj survoje al Maljorko, eskortitaj de la germana kirasŝipo «Admiralo Scheer» k du germanaj detruŝipoj je modelo *Mowe*.

● En itala revuo *Il Mediterraneo*, generalo Ambrosio Valatti, kiu komandis trupojn en Abisenio k en Hispanio, skribas jenon: «Jam alvenis momento, kiam la mondo devas sciiĝi, ke la kampanjo de Hispanio estas daŭrigo de tiu de Abisenio. Ni bezonas trudi nian influon al hispanoj, ĉar se ne okazus tio, neniam ni atingus, ke la Mediterraneo estu itala lago, kiel anticipis la *Duce*. Tial ni helpas Frankon!».

● La itala agentejo *Stefani* publikigas jenan scigon: «La partopreno de italaj korpusoj en la aragona ofensivo, kaŭzis ĝis nun jenajn viktimojn: 29 oficiroj k 253 legianoj mortintaj; 23 oficiroj k 1.349 legianoj vunditaj, k 33 malaperintaj». Tio ja povas esti utila al la fama Komitato.

● La hispana ministro pri Nacia Defendo publikigis la 28. Marto longan liston de la militmaterialo, kiun la hispanaj faŝistoj ricevis de la 27. Februaro ĝis la 20. Marto, aere k mare. Ni ne publikigas ĝin detale ĉar estas tro longa, sed tiu oficiala raporto eble aperis en ĉiulandaj gazetoj. Ĝi montras klare la «Ne-Intervenon» de Germanio k Italio en nia milito. Malgraŭ tio, la angla registaro ankoraŭ asertas, ke ne ekzistas pruvoj.

● La 29. Marto en urbo Castellon, kvar germanaj aviadiloj *Junker* bombardis la provincan hospitalon, kie ili detruis la sekciojn de frenezuloj k infanoj. La malsanuloj, tie loĝantaj, pereis. Poste, la samaj aeroplanoj bombardis la laboristan kvartalon de la urbo, semante morton.


● La respondo de generalo Franko al angla registaro ne kontentigis sinjoron Chamberlain, kiu volas helpi la faŝistojn sen risko de sia «humaneco». La hispana «diktatoro» asertas, ke la urbo Barcelono estas gravega milita celo. Oni ne povas dubi tion, konsiderante, ke en ĝi loĝas multe da maljunuloj, virinoj k infanoj. Krome, ankaŭ ekzistas multaj hospitaloj k belaj monumentoj.

● La ĉarma k tutmonde konata filmaktorineto Shirley Temple malpermesis prezenti siajn filmojn en faŝistaj landoj. Ŝia administranto avertis, ke la infanoj ne devas enmiksiĝi en politikaj aferoj. Ŝi respondis, ke la hispanaj infanoj ne enmiksiĝis en politiko k tamen, la faŝistaj bomboj murdas ilin ĉiutage.

● La dek aeraj bombardadoj, kiujn suferis Barcelono dum la tagoj 17. k 18. de Marto, kaŭzis la mortigon de 118 infanoj, 147 virinoj k 510 viroj, krom 1.520 vunditoj enhospitaligitaj.



BLUM
aŭ la demando-signo



La junaj virinoj nelaciĝas apud kudromaŝinoj

## ALVOKO

La nederlandaj antifaŝistoj k amikoj de Hispanio, estas petataj helpi niajn nederlandajn kamaradojn, kiuj eldonas la nederlandlingvan tradukon de POPOLA FRONTO. Ankaŭ ili estas petataj sendi p. m. el diversaj landoj por vendi la p. m. al petintoj; monon oni sendos al la administracio.

Sin turnu al

POPOLA FRONTO
Nederlandlingva eldono
Loosduinseweg 179 HAGO (Nederlando)

# MINISTRA OPINIO

Indalecio Prieto, socialista ministro por la Nacia Defendo, ĵus faris al korespondanto de Londona ĵurnalo jenajn interesajn deklarojn:

La mil mortintoj, en Barcelono, pro la bomboj de la italaj k germanaj aviadiloj, tragike montras la veron de la okazintaĵoj en Hispanio. Sub preteksto de civila malakordo, preparita en Romo k Berlino, akrigita per legio da spionoj, du nacioj entreprenis la taskon forrabi niajn riĉaĵojn k akiri gravajn militajn poziciojn.


Militistaj kontingentoj el Italio k Germanio, kun abundega k plej moderna materialo militas en Hispanio; kial? Ĉu pro simpla politika simpatio kun la ribeluloj? Estus tro naive pensi, ke tiuj du landoj eluzas sian armeon k malŝparas sian materialon pro nura simpatio. Ili batalas por sia propra intereso. Tio estas sufiĉe klara!

En internacia politiko, varias la amikecoj, sed la geografio restas neŝanĝebla. Italio k Germanio, konsciinte je la strategia geografia valoro de Hispanio, decidis alproprigi al si nian landon. La afero urĝas; post impona premego, la italaj divizioj, kun germanaj kanonoj k aviadiloj, intencas atingi la okcidentajn bordojn de la Mediteraneo. Germanio k Italio akcentas per tio la minacojn kontraŭ Francio.

Certe, Hispanio tute ne kulpas! Hispanio, dum dudek monatoj elverŝas sian sangon k detruas sian ekonomion. La kulpo falos, plenplene, sur la regantojn de Anglio k Francio, kiuj laŭ eraro, sen precedenco en la historio, helpadis siajn estontajn atakintojn: suĉigis siajn estontajn kruelajn ofendantojn, per la absurda Komitato pri la Ne-Interveno.

La hispana Respubliko surportas ŝarĝon, kiun ĝi sola ne devas elteni, ĉar Hispanio, defendante sian liberecon, defendas ankaŭ unuavice la interesojn de Anglio k Francio. Eĉ tion sciante, Hispanio nur petis, al tiuj du potencoj, sian legitiman rajton aĉeti, per sia oro, la necesajn armilojn por defendi ilin defendante sin. Sed tiu peto, tiel justa k elementa, estis rifuzata. Kia grandega ofendo, antaŭ la historio, de la regantoj, kiuj tiamaniere agis!

Oni ĵus demandis al mi pri la rimedoj, kiujn oni povus apliki. Mia respondo, tiurilate, estas unu tre facila: La regantoj de Anglio k Francio devas reakiri la trafan sencon de sia alta respondeco. Ili devas rapide ŝirmi la interesojn de la gvidataj nacioj, kiuj multe suferos pro falsaj rigardoj, tra erarigaj okulvitroj, al la karaktero k signifo de la internacia milito, kiu nun furiozas k freneze flagras en Hispanio.



## NIA SANKTA KOLERO

Dum la daŭro de ĉiuj horoj de la 18. de Marto, suferis Barcelono la plej teruran bombardadon el ĉi tiu milito. Mortis preskaŭ mil personoj k restis vunditaj grandega kvanto. Falis cent domoj, difektiĝis multaj pli k rompiĝis preskaŭ ĉiuj kristaloj de la bela kataluna ĉefurbo.

Jen do la militaj celitaĵoj de Franko k liaj mastroj internaciaj: Civitanaj domoj, lernejoj k universitatoj, muzeoj k hospitaloj, virinoj k infanoj... Tie, kie floras kulturo, homeco k vivo, semas detruon k morton la faŝistaj aeraj piratoj. Rigardi la damaĝojn ne jam vekas teruron sed koleron k indignon. Neniu rajtas heziti antaŭ la senbrida barbareco de tiuj, kiuj tiel malkaŝe anticipas la metodojn de plej kruela k sovaĝa reĝimo.

La naŭza batalkrio de la hispana faŝistaro: *For la intelekton!* estas sanga atesto en Barcelono nun, kiel antaŭe estis en Madrido k en multaj aliaj lokoj. Sed la obstino de nia popolo estas pli granda ol la freneza rabio de la modernaj barbaroj. Hispanio, tra la poroj de siaj urboj plej belaj, ŝvitas per sango sed ĝi defendas la dignon de nia epoko, k defendante tion, ĝi rajtas rigardi kompateme — anstataŭ almozeme — la bombastan fieron de tiuj nacioj, kiuj malgraŭ sia forto, akceptas la ofendojn k rikanojn, kiujn la hispanoj tre aroge rifuzas...

## NE FORGESU

Traduki en vian nacian lingvon la artikoleton «La Ŝafideto» kiu aperis en la antaŭa numero. Zorgu pri ĝia represo k sendu akurate du kompletajn bonstatajn ekzemplerojn de la koncerna gazeto!

# ESPERANTO EN ITALIO... TRA SVEDA REKLAMETO

En la neŭtrala Esperanto-gazeto de Svedio, mi trovis jenan kuriozan frazon:

> «Samideanoj tutmondaj! Subtenu la Esperanto-disaŭdigojn el Romo, ĉar se vi subtenas Romon, ni eble gajnos Hispanujon, Portugalujon k, fine, Germanujon k ankaŭ revivigos Rusujon.»

Tiuj ĉi vortoj multe okupis miajn pensojn. Sed, ĝis nun, ankoraŭ mi ne komprenis la signifon. Oni preskaŭ povus kredi, ke la raportinto volas diri, ke la Esperanto-movado en Hispanio, dependas aŭ dependos de Italio; ke dank' al Italio povas kreski forta esperantismo en Hispanio! Mi ne volas nei, ke Italio jam zorgis pri la hispanaj esperantistoj. Ni prenu nur la ekzemplon de Kordobo, kie Franko—servistaĉo de Italio k Germanio—murdis ĉiujn esperantistojn. Tamen, la plej simpla konkludo, el la koncerna frazo, diras ke ĝia aŭtoro estas konscia faŝisto. Tiuokaze, mi ne bezonas fari longajn komentariojn pri tio. Sed, pri la temo «Esperanto en Italio» mi volus fari kelkajn demandojn al ĉiuj veraj idealistaj esperantistoj: Ĉu ili fakte kredas, ke la uzado de Esperanto, por faŝista propagando, estas ia progreso por ilia movado?

Ni prenu unu ekzemplon: Antaŭ kelkaj jaroj, oni multe aŭdis pri societoj de banditoj en amerikaj urboj. Supozu do, ke kelkaj el tiuj banditoj—se iu el ili konservas ombreton de homeca sento, en sia koro, mi petas pardonon, ke mi komparas ilin kun la italaj faŝistoj—komencus lerni Esperanton, ĉu ili tiam tuj fariĝus «samideanoj»? Ĉu tio estus sukceso por Esperanto? Se jes, mi volus rekomendi al ĉiuj murdistoj k krimuloj tuj eklerni tiun mirindan lingvon, ĉar se ĝi povas fari blankajn anĝelojn, el la faŝistoj, plej kruelaj estaĵoj en la universo, tiam ĝi certe ankaŭ taŭgas por malgrandaj krimuloj. Al tiuj naivuloj, kiuj kredas, ke oni povas esti neŭtrala k simpla esperantisto, mi volas diri: Forĵetu tiajn iluziojn! Ju pli rapide des pli bone. Se la Faŝismo venkas en tuta Eŭropo, la regantoj malpermesos Esperanton. Kaj vin, naivulojn, oni starigos ĉe la muro, se la perversaj faŝistoj ne preferas vin mortigi per pli kruela maniero. La fidela hundaro, kiu konscie laboras por la Faŝismo k tiu, kiu ĉiam estas preta leki la botojn de despoto, eble rajtos vivi. Kaj certe, dum regado de la tiranio, ne mankos al li ostoj...

GUTĈO STOCKHOLM (Svedio)

# LA SINDIKATA UNUECO JAM ESTAS FAKTO!

Kun nepriskribebla ĝojo, ni informas niajn kamaradojn pri la plena sukceso de la interparoladoj de niaj du potencaj Sindikatorganizoj, pri kio ni jam raportis en antaŭaj numeroj. Pli vigle ol ni, por doni impreson al niaj legantoj tiurilate, la Manifesto, kiun eldonis la subskribintoj de la Akordo povos bildigi la gravecon de tiu historia interkonsento, per kiu la hispana proletaro jam interfratiĝinta fakte dum la milito, ekde la komenco de la faŝista ribelo, certigas la estonton de la laboristaj konkeroj, akiritaj en la daŭro de nia bolanta revolucio, k preparas la fundamenton de vera popola Demokratio. Tial ni ĉi-sube publikigas la Manifeston. La proksima numero entenos la klaŭzojn de la grava interkonsento.

«Laboristoj: En historie decidaj momentoj, la Nacia Konfederacio de Laboro k la Ĝenerala Unuiĝo de Laboristoj, ĵus subskribis programon de unueca agado. La plej sopirata deziro de la laborista klaso estas nun jam realo, tuj fruktodona. Milionoj da hispanaj laboristoj, envicigitaj en la du grandaj Organizoj, kuniĝas per fortika brakpremo, sub ambaŭ flagoj, por batalo k venko. Ili sin pretigas plenumi sian devon, alfrontante la militon k la revolucion en fabrikoj, en laborejoj k en la kampoj de Hispanio.

Malantaŭ la miloj k miloj da soldatoj, plejparte filoj de la laborista klaso, la laboristoj de la du Sindikataroj starigas rezistan muregon. Kaj ili, kunaj, akcelos ĉiujn maŝinojn k ilojn de la produktado al la proksima finvenko, kiun la proletaro atingos kun la ceteraj antifaŝistaj fortoj de la lando.

Tiu ĉi unueca agado de la laboristoj, ĉies sopiro tra ĉiuj luktoj de nia klaso, sangumita per la sango de ĉiuj persekutitoj, de ĉiuj niaj klasfratoj, ekspluatitaj de la malamikoj de la laboristaro, estas hodiaŭ absoluta garantio, ke la laborista klaso konkeros sian estonton kun la nacia sendependeco; sian estonton, kiu prezentiĝas plena je sennombraj ebloj. La unueco utilos por ke la sindono k la klopodoj de la laboristoj multobliĝos konstante, pliigante la produktadon de la militindustrio. Utilos ankaŭ por malhelpi ĉian sabotadon, por helpi la aliĝon de la virinoj al la laboro, anstataŭante la mobilizintajn virojn; ĝi utilos por solvi bazajn problemojn, per kunhelpo de la laboristaro, k fine progresigi la disvolviĝon de ĉiuj konkretaj aspektoj de la produktado.

La unuiĝo de la du Sindikataroj havos, nekalkuleble, valorajn sekvojn en ĉiuj direktoj de nia batalo kontraŭ la Faŝismo. La plej urĝaj bezonoj de la milito povos esti efike atentataj, pli efike ol ĝis nun. Kunlaborante al la kuraĝa rezisto de niaj soldatoj, la Sindikatoj metos en sia tagordo la zorgojn pri akurata fortikigo de frontoj, marbordoj k urboj. Dekoj da miloj da laboristoj povas esti mobilizataj urĝe tiucele.

Laboristoj! La unuiĝo signifas la garantion, ke nenio k neniu povos renversi aŭ malpliigi viajn revoluciajn konkerojn, ke la laborista klaso marŝos antaŭen tra la vojo de sia definitiva liberiĝo; ĝi estas la leĝa garantio de la proletaro; de nia propra estonteco, konkerata de la laboristaro per elverŝo de sia sango k sia senĉesa klopodado. Estu certaj, ke tiu unuiĝo superos tiun ĉi etapon de glora rezisto kontraŭ la invadaj, maŭraj k alilandaj, trupoj.

En tiuj ĉi momentoj, kiam la Popola Armeo bataladas por bari la vojon al la malamiko, la faŝismo penas sensukcese submeti al sia jugo la hispanajn laboristojn. La ŝtorma forto de la Sindikatoj—de ĉiuj Sindikatoj de la lando—certigas la mobilizon de novaj miloj da homoj. Ni fratece klopodos por efika preparado de la novaj batalantoj. La Sindikatoj ne hezitos por fordoni al la popolo tiom da soldatoj, kiom ĝi bezonos k por havigi ilin al ĝi en kondiĉoj de batalemo k entuziasmo, kiuj kondukos ilin al finvenko.

La vigla zorgo de niaj revoluciaj Sindikataroj, en la ariergardo, sufokos la subfosan laboron de la malamikoj, embuskitaj ĉe ni, k malvenkigos, por ĉiam, niajn klasmalamikojn. Batalunueco, kamaradoj! Revolucia unueco, laboristoj de U. G. T. k C. N. T.!

La naciaj gvidantaroj de ambaŭ organizoj scias, ke via entuziasmo, antaŭ la subskribo de la unueca programo, estos impona armilo, svingebla kontraŭ la malamiko por fiaskigi ĝin. Via sindikata unueco, la unuiĝo de ĉiuj hispanaj laboristoj organizitaj, nuligos ĉiujn provojn por estigi heziton aŭ malkuraĝon.

La U. G. T. k la C. N. T. samtempe publikigante agad-programon por komuna celo, proklamas antaŭ la hispana popolo k antaŭ la tuta mondo, antaŭ ĉiuj laboristoj de la Terglobo, por kies libereco batalas ĉi tie nia proletaro, ke ni ne toleros manovrojn kontraŭ la estonto, ke neniu povos spekuli pri kapitulaciaj planoj, sur la bazo de ajna kompromiso. La sindikatoj observos vigle por malhelpi tion! La sindikatoj tuj leviĝos unuanime, antaŭ simpla suspekto pri perfido, por apartigi de niaj vicoj la hezitemulojn k puni rigore ĉiuspecajn perfidemulojn!

La lukto nur finiĝos la tagon, kiam per nia plena k absoluta venko, la hispana proletaro povos rigardi la estonton fiere k kun fido, k firmigi la venkantan realiĝon de siaj progresoj k konkeroj sociaj. Nenia paco sen la venko! La laboristoj akceptas nenian pacon, krom tiu, kiun ili penige konkeras per sia pasia rezisto k batalo! La laborista klaso nur akceptas unu finon: la venkon!

Vivu la unueca agado de U. G. T. k C. N. T.! Antaŭen la proletaro ĝis la finvenko! Unuiĝo, por rezisti k venki, ĉiuj en Sindikatoj de Hispanio!

LA INTERLIGA KOMITATO C. N. T.-U. G. T.

Barcelono, 18. Marto 1938.

En iu laborista gazeto esperantista, oni profitas eĉ plej etan detalon por «pruvi» ke niaj diroj, pri la proleta unueco en Hispanio, estas mensogoj, *kiujn la faktoj dementas*. Ankoraŭ ni ne komprenas la grandan intereson, de tiu gazeto, por eviti ĉiun harmonion k kunlaboremon inter la laborista k popola familioj. Tamen, la veraj faktoj nur dementas la fantaziajn *faktojn* de tiuj obstinaj malamikoj de la unueco. En la tranĉeoj k en la fabrikoj, jam de multa tempo, neniu diskutas pri siaj apartaj tendencoj. Por pravigi, niajn asertojn ni ne bezonas tordi informojn nek flegi kverelemajn maniojn. La interesa Manifesto, pri la fakta unueco inter C. N. T. k U. G. T. parolas *oficiale* sufiĉe klare por mutigi la buŝojn de tiuj, kiuj ŝajnas montri simpation al la Revolucio nur en ĝia detruema fazo...

# LA OBSERVADO EN LA MILITO

La modernaj armeoj, por efike batali, bezonas tre bone organizitan Informservon. Unu el la fontoj de ĉi tiu servo estas la Observado, en kies fako mi estas okupata. Tial ke, en la Centra Sektoro, la milito stagnas nuntempe k, sekve, mi ne havas interesajn raportojn por rakonti al miaj karaj legantoj, mi penos priskribi al vi hodiaŭ je kio konsistas la Observado.

Interparenteze, mi rimarkigu antaŭe ke mi permesis al mi skribi, «miaj» legantoj, ĉar laŭ multaj leteroj ricevitaj, mi konstatis plezure, ke miaj seninteresaj artikoloj estas interese legataj de multaj nekonataj amikoj el diversaj landoj. Nu, bone; la devo de la observisto estas koni ĉion, kio okazas en la malamika kampo; k samtempe, ke la malamiko konu nenion, kio okazas en la nia propra.

Por efektivigo de sia misio, la observistoj prenas siajn optikajn aparatojn k serĉas la plej bonan k dominantan lokon, sur supro de alta monto, kie ili tuj instalas la Observejon, por observi sen esti observata.

La observado sur la malamiko estas konstanta, dumtage k dumnokte, sen perdi eĉ plej malgrandan detalon pri la aktivecoj de la malamiko. La observistoj devas sciiĝi, kiel ajn, pri la tuta organizo de la kontraŭaj fortoj. La transkurintoj havigas ofte bonajn informojn pri tio. Oni devas ankaŭ kontroli la fortoŝanĝojn k la trafikon de la malamikaj veturiloj, ktp.

Dum batalo la Observejo informas la Stabon, se la malamiko ricevas freŝajn fortojn, se ĝi evakuas aŭ sieĝas iun pozicion. La Observejo penas lokalizi tiel la malamikajn maŝinpafilojn k artilerion, notante samtempe pri la efiko de la pafoj de la nia propra.

Krom la Observado, la observistoj havas alian ne malpli malfacilan taskon, nome la kontraŭ-observadon, kies zorgo estas: La malamiko ankaŭ observas; ni trompu do la malamikon. La malamiko aŭskultas dumnokte; la malamiko sciiĝas kelkfoje pri niaj telefonadoj; la malamiko, per aviadiloj, fotografas niajn liniojn k niajn tendarojn k serĉas la enlokiĝon de niaj pozicioj, de niaj Staboj, de niaj Observejoj, de nia Artilerio. La malamiko soifas sciindaĵojn. Do, ni mem lerte k ruze donu al ĝi tiajn novaĵojn, sed falsajn, k ni trompos la malamikon...

Do, kiel oni vidas, la observisto havas taskon sufiĉe komplikan k kelkfoje amuzan... se ne ekzistus obusoj k bomboj, k oni ne dormus sub-surtere. La milito, kiel ludo, estus agrabla. Kiam en la mondo regos paco, se vi volas, ni ludos je tio; sed, la obusoj estos el ĉokolado, la bomboj el dolĉaĵoj k la batalkampo en komforta ĉambro, ĉu?... Kaj, eĉ tiam, se vi permesas, mi ne kunludos, aŭ mi estos el la Ne-Intervena Komitato.

...Nur por defendo de la Libero—de la Socialismo!—mi reprenus la armilojn, ĉar la Socialismo ja valoras la tutan sangon proletan!

Rikardo KILES

Fronto de Madrido, 18-3-38.

NOTO.—Mi dankas elkore la estimatajn gekamaradojn, kiuj sendis materialon por la surbatalkampa priesperanta ekspozicio. Ĉar la ekspozicio estas permanenta, mi petas daŭrigi la sendadon al mia nova ĉi suba adreso, petante al multaj, ke anstataŭ leteroj, bonvolu sendi il. pk-ojn, kiuj ja estas pli taŭgaj por ekspozicio.

Jen mia adreso: RIKARDO KILES
99 Brigado E. M., Base 1.ª C C, num. 1 (Hispana Respubliko)


## GRAVA LABORO POR NIA AFERO

La Komitato por Helpado al Hispanio, en Nederlando, organizas vagantan ekspozicion pri la vero en Hispanio. Multaj pruvoj montras la *benon* de la Ne-Interveno. La ekspozicio estas aranĝata en ĉiuj kvartaloj de Amsterdam k poste en tiuj urboj, kie ĝi estos permesata. Ĉiu esperantisto montru intereson k vizitu tiun ekspozicion. Ĝi estas vere vizitinda k klare montras la hodiaŭan staton de la milito. La sama Komitato fondis Junularkomitaton por interesigi la gejunulojn pri Hispanio. La Sekretariejo estas

KOMITATO POR HELPADO AL HISPANIO
GAASPSTRAAT, 23 — AMSTERDAM (Nederlando)

Esperantistaj gejunuloj, kiuj volas kunlabori anoncu sin al tiu adreso!


# HELPANTE NIN, ONI HELPAS SIN!

En la ĵusa Konferenco de la Socialista k Laborista Internacioj, la delegitoj de Aŭstrio k Ĉeĥoslovakio parolis trafe. Eble ne multaj komprenis la grandan signifon de kelkaj frazoj el aŭtoritataj buŝoj. Ni volas do ilin disvastigi! Jen la vortoj:

> Ne parolu pri Aŭstrio nek pri Ĉeĥoslovakio. Parolu nur pri Hispanio! El la sekvo de ĝia milito dependas la sorto de la mondo. Sur ĝia tero, makulita per sango de herooj, oni vetas pri la sendependeco de Aŭstrio k pri la sekureco de Ĉeĥoslovakio. Hodiaŭ, nia devo, plej sankta k urĝa, vokas nin subteni streĉe la lukton de la hispana popolo. Se Hispanio venkas, Aŭstrio estos libera k Ĉeĥoslovakio sendanĝera. La paco, la libero k la demokratio finfine saviĝos dank' al la mirinda defendokapablo de kuraĝa civitanaro.»

Oni diras, ke, antaŭ proksimeco de la morto, oni plene konscias pri la grandaj realoj. La ĵus parolintaj amikoj ne estas ja ankoraŭ en tia situacio. Sed, ili flaras la danĝeron tiel akute, ke iu klara intuicio avertas, pri apokalipsaj malbonoj, se la demokrata opinio kompatas la nunajn suferantojn, anstataŭ ol aktive ataki siajn estontajn suferigantojn. La vortoj de tiuj delegitoj estas alta leciono. Ili prave scias, ke post venko de l'Faŝismo ne estus ebla eĉ la plej mizera paco. Ili scias tion pli bone ol ĉiuj aliaj personoj, kiuj konsideras sin sekuraj tial, ke ankoraŭ ili ne aŭdas la zumadon de banditaj motoroj super siaj kapoj.



Aŭskultu do tuj la mondo la vokon de honestaj voĉoj, kiuj, en nehispanaj buŝoj, povas ŝajni pli objektivaj, ĉar strange ankoraŭ, en multaj cerboj, valoras pli absurda humila submetiĝo ol energia memdefendo! La demokrataj nacioj devas kompreni la senefikecon de siaj fortikaĵoj, kiam la malamiko trafos ĝiajn pordojn. La Faŝismo gajnas forton, kiun ĝi akumulas el ĉiu konkeraĵo. La Faŝismo neniel donacas ripozon al siaj viktimoj, sed ĝi inokulas al ili detrueman febron. Kia sarkasmo estas jam nur la supozo, ke ĉiuj, kiuj nun obstine batalas, kontraŭ la despotismo, povus iam ajn—eble tre proksime—marŝi konkereme, sub vipo de tiu sama despotismo, kontraŭ la libereco de tiuj, kiuj stulte perdus tion, ne helpinte oportuntempe iliajn klopodojn...

Vole nevole, oni devas agnoski, ke la Faŝismo en sia universala ofensivo, havas la avantaĝon de klasa unueco, por konkretaj difinitaj celoj, dum la popoloj, eĉ por elementa defensivo, misuzas sian forton, detruas sian masivecon per grumbloj, suspektoj k eĉ batoj pli aŭ malpli teoriaj...

Observu la okazintaĵojn, kara leganto, observu, studu k deduktu, akorde kun ni, ĉu ne meritas stampon je perfidulo, ĉiu, kiu ŝatas pli la negativajn punktojn, kiuj disigas ol la pozitivajn taskojn, kiuj unuigas en ĉi tiu grava momento de nia historio...

## ANONIMECO

La unupersoneco malaperis en nia batalo. Tial, en ĉiuj niaj frontoj, okazas epizodoj, kiuj atestas pri la heroeco k sindonemo de la soldatoj, senplende oferantaj sian vivon por la libereco k progreso.

Mirinda k grandioza estas la fervoro, kiu altigas la lukton k honorigas la morton de la hispana junularo. La danĝero ne jam estas ĥimero! Ĝi ŝvebas ordinare tra la batalkampoj aŭ super la korpoj de virinoj, infanoj k maljunuloj en ĉiuj ariergardaj urboj. Sciigoj, kiujn ni ricevas el plej riskoplenaj lokoj, konfirmas—kontraŭ la opinio de kelkaj psikologoj — ke eĉ la plej simplanima homo, en decida momento, estas kiu plej serene k stoike defias la morton. En la unuaj tagoj de la ribelo, en sektoro el la montaro apuda al Madrido, dekdu milicanoj estis sieĝitaj de la faŝistoj. La dekduo da soldatoj nur posedis por ĉiuj... unu fusilon!

—Tio ne gravas!—diris la plej malhezitema.—Mi pafos k vi atendos kaŝite. Kiam min trafos faŝista kuglo, devas veni iu alia el vi k preni la armilon ĝis la sama fino. Poste devas sekvi la tria, la kvara k tiel plu, ĝis... la dekdua. Ĉu vi konsentas?—Absolute ili konsentis! Kaj la dekdu bravuloj falis, unu post alia, kiel anonimaj gigantoj de la plej granda socia epopeo.

Similaj epizodoj floras ĉiutage. Multaj restas nekonataj, aliaj cirkulas de lipo al lipo, akirinte ĉarman kategorion de legendo. En tranĉeo el pozicio de Aragono, iu kaporalo vundiĝis tre grave. Energie li rifuzis iri al proksima ambulanco.

—Lasu min pafi—li diris—ankoraŭ restas al mi multa municio!—Kun la lasta pafo, li donis la lastan spiron. Li mortis sur sia posteno. En la ariergardo ankaŭ abundas kortuŝaj scenoj. Unu patrino, kun hejmo detruita pro faŝista bombo, ricevas malĝojan avizon, ke ŝia filo ĵus mortis. Kun ploro en okuloj k sufero en la koro, ŝi rigardas siajn du pli junajn idojn dirante:

—Ankoraŭ mi povas doni du novajn batalantojn!...

De la frontoj de Andaluzio skribas soldato:

«Dum multaj semajnoj, mi estis sub granda danĝero. Nun, feliĉe, mi ripozas en ĝardeneto de farmejo, kie mi provizore loĝas. Du maljunulinoj tre karese zorgas pri mia komforto, kvazaŭ mi estus bubo. Finfine, mi povis ŝanĝi ĉemizon. Estas granda feliĉo, por mia brusto, ricevi tiun blankaĵon, kiu hejmece odoras je amelo...»

Nenion plu li petas. Sufiĉas, post pluvo de mitralo, post barakto en koto k ŝlimo, la milda kareso de pura ĉemizo sur karno de anonima antifaŝisto.

Jen do, kiaj simplaj manieroj agi k reagi de la veraj herooj. Ili estas humilaj k sobraj, sen fiero nek bombasto; sed ankaŭ sen timo nek cedemo. Kiam ili tremas ne kulpas la malkuraĝo. Aŭskultu:

En vilaĝo konkerita de faŝistoj. Oni arestis maljunulon je sepdek jaroj. Li estis transportata, kune kun aliaj, apud la muroj de tombejo, por atendi la vicon de sia ekzekuto. Falis, unu post alia, amikoj k familianoj, Tiam alproksimiĝis al li faŝista kanajlo, samvilaĝano, kiu mokeme alparolis lin:

—Ŝajnas, ke vi tremas, Petro.—Kaj la bona homo nur respondis: —Jes, sed pro mia maljuneco!

## PLIBONIGOJ EN AGROKULTURO



Je nomo de pura raso!

Tuj post kiam la Popolfronta Registaro ekregis, ĝi komencis plibonigi la agrokulturon. Tri milionoj da hektaroj de nekulturita tero estis depreantaj el la terposedantoj k donataj al la kamparanoj. Ne pensu, ke la posedantoj restis nepagataj; tute male, la Registaro tre mirinde rekompencis la malprofiton, k tiamaniere forprenis ian ajn argumenton kontraŭ tia konfiskado. Sumegojn oni disponigis por kulturi la teron k zorgi pri bezonata akvo.

Ili rajtis havi bonan esperon, en bona edukado de agrokulturo. La kamparanoj vivis en epoko, iam flame dezirata k nun baldaŭ efektivigata. Ankaŭ la edukado, per popollernejoj, estis plibonigita. Trafe la Registaro komprenis kiom multe ĝi devos fari por forigi la regreson k egaligi la edukan staton de Hispanio kun la nehispanaj landoj. Jam en la jaro 1931. ĝi fondis novajn lernejojn. Dum jaro 1930; estis fonditaj 945 lernejoj; dum la jaro 1931—unua jaro de la Respubliko—estis kreitaj pli ol 7.000 lernejoj, k tiu nombro povus esti pli alta, en sekvantaj jaroj, se nur la reakciuloj ne estus agintaj kontraŭ ĉia plibonigo. Dum la milito, en jaro 1937. estas malfermitaj 7.579 novaj lernejoj.

Tamen, ne pensu, ke aliaj edukadoj malprosperas; tute male, asekuroj por maljunuloj, akcidentoj, patrineco k senlaboreco estis instalitaj, eĉ parte leĝe devigaj, por laboristoj k oficistoj. La asekuro kontraŭ akcidentoj donas dumvive subtenon al ĉiu, kiu havas rajton. Jam preskaŭ kvin milionoj da virinoj sin anoncis ĉe la asekuro por patrineco. Dum la jaro 1935. la Registaro jam elspezis naŭoble pli ol la reakcia registaro dum 1932. al sama kvanto da senlaboruloj k eĉ tiun sumon oni ege kritikis en la parlamento. Ĉio tio certigis la bonfarton de la popolo. Sendube oni devis oferi ion el tiuj, kiuj malgraŭ ke ili estis la malplimulto, havis tamen la malmodeston ekspluatadi k subpremadi la popolon laŭ siaj emoj. Ili estas la malamikoj de la Respubliko, vidinte ke iliaj profitoj estas minacataj pro la progresoj, jam klare vidataj, dum la ekreĝo de la hodiaŭa Registaro, kaŝe k eĉ malkaŝe ili pretigis la ribelon.

Ili mem, estis tro malpotencaj por tion fari solaj k tial ili akceptis helpadon de du registaroj, kiuj ege malŝatas, ke apud Francio ekvivus nova demokrata lando. Germanaj k italaj aviadistoj, provizitaj per perfekta materialo, k maŭraj legianoj, klopodis invadi Hispanion, sub lozungo: *Ni faru nacian laboron! Por la beno de la patrio!* Germanio k Italio havis, kompreneble, tute aliajn celojn ol tiuj de Franko k siaj malhonoraj kolegoj. Jam longan tempon, antaŭ la ekribelo, komencis la *nazi*-agentoj k provokistoj propagandi kontraŭ la demokratio; la kerno de tiu agado estis ĉiam en germanaj konsulejoj. Pri tio, ni havas pruvojn!

Kompreneble, al tiuj pruvoj, la germanoj ĉiam respondas naive: «ne estas vero!». Tamen, jam dum longa tempo la germana Registaro avidas hispanajn krudaĵojn, kiujn oni bezonegas por rearmado. Ĉio, kion ili bezonas, estas trovebla en Hispanio: karbo, antinomio, fero, kupro, stano, plumbo, lignito, sulfo, piritoj, k. t. p.

Jen la kialoj, pri interesiĝo de nehispanaj registaroj por teritorio ekster sia propra. Estas komprenebla fakto, ke kelkaj registaroj ĉiam revas al pligrandigo de sia lando, sed pri tio temos aparta artikolo.

Kompiltradukis, PETRO DE L' BRETO
AMSTERDAM (Nederlando)

**En Hispanio, pli krude ol alie, la popoloj rigardu sian propran sorton!**

BELGA KUNLABORO

# ĈU KUNKULPULOJ?

Resumo de grava artikolo de Louis De Brouckere. Prezidanto de la II.ª Internacio, aperinta en la socialista gazeto el Bruselo «La Popolo».

Gravega konferenco okazis en Londono, kunvokata de la Universala Asocio por la Paco k kun la kunlaboro de la asocioj favoraj al la Ligo de Nacioj.

Grandegan sukceson ricevis la amasokunvenego, organizita de tiu ĉi konferenco: Du el la plej grandaj teatroj de Londono estis plenplenaj.

Temis pri helpo al Ĉinio, viktimo de monstra atako! Temis scii tion, kion faros la popoloj antaŭ la terura inerteco de siaj registaroj.

Temis scii tion, kion ĉiu pacamanto praktike faros por malebligi la frakason de la malfortulo fare de krima fortulo. La ideo de l' *Bojkoto* estis precipe akcentita. Kial? Tial ke aplikota al Japanio, ĝi estas tre efikal

Por fari militon, ne sufiĉas la krima volo k la cinika bruteco; ne sufiĉas posedi homamason, kiun oni povas konduki al buĉado; necesas ankaŭ posedi aŭ aĉeti grandajn kvantojn da ŝtalo, kupro, zinko, nikelo, aluminio, kotono k lignomolaĵo por fabriki la eksplodaĵojn; necesas posedi aŭ aĉeti petrolon por ĉiaj transportiloj. Fakto estas, ke Japanio malhavas tiun materialon krom la ŝtalo, sed eĉ je tio ĝi ne fabrikas sufiĉan kvanton por siaj militaj bezonoj.

La ebleco daŭrigi ĝian krimon estas donata al ĝi de ĉiuj regnoj, kiuj vendas al ĝi tiujn necesaĵojn k de la popoloj, kiuj havigas al ĝi la monon, aĉetante ĝiajn produktojn.

Do ĉiuj registaroj estas kunkulpuloj de la krimo, k la popoloj estas nekonsciaj helpantoj al tio.

Ni estas kortuŝataj, kiam ĉe la kinejo, ni vidas buĉadon fare de aeraj torpedoj. Sed ni tro facile forgesas, ke ni povas ilin malebligi.

La kongreso, kiel ĉiuj antaŭaj similaj kongresoj, konkludis, ke urĝas skuegi la publikan opinion, kiu jam de kelkaj jaroj malribele submetiĝas al internacia politiko, neakceptebla por civilizataj popoloj.


La atakantoj de aliaj landoj estos rapidege sekvataj de atakantoj al *via* lando. La malhonto k la fia maltimo de la atakantoj estas proporcia je la neagemo de la atakotoj. Do defendante la senkulpulojn, vi defendos samtempe *vin mem*.

Nel *vi ne* estos kunkulpuloj de la krimo. Vi praktike agos. *Vi* ne plu aĉetos ion ajn, antaŭ ol certiĝi, ke ĝi ne devenas el Japanio. *Vi* protestos kontraŭ la malagado de *via* registaro *vi postulos ŝtalan punon* al atakantoj k *ŝtalan helpon* al la atakatoj.

Por gardi la civilizon, *antaŭen!*

El franca lingvo tradukis

M. DELFORGE Charleroi (Belgio)



Drasta sceno el la faŝista zono

# PIEDBATANTE LA TEMPON!

## (EL MILITA MURGAZETO)

Dum ni batalas kontraŭ la faŝistoj, forpasas tempo, kiun ni profitas por propra utileco. Ni ne nur luktas ĉe la frontoj sed, samtempe, ni organizas pli efike nian armeon, plibonigas la popolan kulturon, intensigas la terkulturan produktadon; unuvorte, ni konstruas plej bonan k plej ĝustan patrion por la estonteco.

Kontraŭe, dum forpasas la tempo, la faŝista malamikaro, kiun ni kontraŭbatalas, agas tute inverse. Ili hipotekas sian ekonomion, liverante al la faŝistaj potencoj la minojn k fabrikojn de nia hispana teritorio, kiun pere de germanaj k italaj trupoj ili konkeris. La plej granda senzorgo, pri kulturo, ekzistas ĉe la regionoj, kiuj restas sub la premo de Franko; ĉiuj riĉaj produktaĵoj eliras senĉese eksportitaj ŝanĝe de armiloj k soldatoj, kiujn Hitler k Mussolini havigas al hispanaj ribeluloj por plidaŭrigi la militon k la suferojn.

Samtempe ol la diktatora ribelulo pliigas sian servutecon, nia firma konvinko, malgraŭ ĉiuj suferoj, donas al ni, ĉiutage, pli da moralo, pli da fido, k hardas nian rezistadan kapablecon, tiel, la triumfo certe estos nia, malgraŭ la indiferenteco de la demokrataj eksterlandaj regantoj, kiuj povas vidi, en nia lukto, la estontecon de siaj propraj landoj, se ili ne kontraŭatakas kuraĝe la faŝismon.

Forpasas tempo! Daŭras la milito... dum en Ĝenevo oni komentas rezignacie la agoniojn de la paca kolombo, al kiu jam de longe oni forprenis ĝian olivarban branĉeton. La hispana popolo, sub pluvo de fero k plumbo, batalante fervore en ĉiuj frontoj, konstruas ekonomion k industrion, rigardante estontece por la feliĉo de la proletaro. Tiu nova ekonomio k tiu potenca industrio savos la Respublikon, post la fino de la milito. Ni altigos la popolan kulturon el kiu fluos la kapablaj bezonataj homoj por gvidi la rekonstruadon.

La malamiko treege koleras pro sia malfrueco en la venko. Tio ĉi mem, por ni, estas oportuna ŝanco; ni nin perfektigas pli k pli; ni nin unuigas pli k pli en nia Popola Fronto, ĉerpante anonimajn valorojn el la neelĉerpebla mino de la popolo.

La tempo do estas malfavora por la malamiko k favora por ni, ĉar tempo, kiu forflugas sen la venko de perfidaj generaloj, estas ŝanco, kiu, nehelpante ilin, helpas nin tre oportune.

Antaŭen ĝis la venko! Antaŭen sur la vojo de semajnoj k monatoj, piedbatante jarojn se necese..

Nia fortikega fido, al la nepra venko, transformos la tempon, en nian plej bonan helpanton!

Salvador DASI

Staba leŭtenanto

Aragona sektoro, 19 - Marto - 1938.

## UNU METODO...

La reakcia deputito Emanuelo Florenza, ĉe la komenco de la ribelo estis arestita en urbeto de Katalunio. La Interparlamentana Unio intervenis favore al la arestito, k la Registaro de la Respubliko tuj liberigis lin.

### EL FAŜISTA GAZETO

«Laŭ ĵusa dekreto de la polica komisaro, en ĉiuj kinejoj k teatroj, dum la paŭzotempo, oni ekspozos la portreton de ĉefgeneralo Franko. La orkestroj ekludos la himnon, kiun ĉiuj aŭskultoj kun la brako etendita. Krome, en ĉiuj kafejoj oni enkadrigos ankaŭ la bildojn de ĉiuj gvidanto de la naciista movado.»

## KAJ ALIA...

La socialista deputito Ludoviko Rufilanchas, ankaŭ ĉe la eksplodo de la komploto, estis kaptita en urbo de Galegio. La interparlamentana Unio intervenis favore al la kaptito. La faŝistoj rifuzis la peton k murdis la deputiton.

### EL RESPUBLIKANA GAZETO

«Laŭ konata normo de la Registaro de la Respubliko, oni avertas ĉiujn organizojn ke la ministroj, dum la daŭro de sia regado, ne povas akcepti omaĝojn nek publikajn laŭdojn. La oficialaj personoj laboras en ŝtataj postenoj, sen vantaj celoj, por gvidi la fervorojn de la popolo; tial ili ne bezonas gratulojn por plenumi sian devon.»

## ABONMANIERO

Nia gazeto ne havas fiksan abonprezon. Ĝi eldoniĝas nur per laŭvola individua monhelpo de sia legantaro. Ni elektis tiun sistemon ĉar tiel, ĉiu kroma sumeto de tiuj, kiuj povas pagi iomete plie, ebligas la ricevon de agrabla legaĵo al multaj, kiuj pro senlaboreco, aŭ aliaj kaŭzoj, ne povas pagi sian propran kotizon. Tial, se la enhavo k celo de la revuo estas por vi aprobinda k plaĉa, pagu vian liberan abonon al iu ajn el niaj internaciaj agentejoj:

ĜENERALA INTERNACIA ADRESO
nur por mono
GUSTAVE FARENC
53, Rue Brise-Pain
Poŝtĉekkonto 13944 Orleans
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

NEDERLANDA ADRESO
nur por mono de holandanoj
PETRO van der PLANK
Van Speijkstraat, 48-I
poŝtĝiro 245542
AMSTERDAM W. Nederlando

BELGIO
K-DO M. DELFORGE
33, Rue de Heigne
Postĝiro 199106
CHARLEROI

ANGLIO
K-DO O. MELTON
23 Fowler Str. Nechells
BIRMINGHAM 7

SVEDIO
ARBETAR ESPERANTISTEN
Barnhusgatan 8 ö. g. n. b.
Postĝiro n.° 53411
STOCKHOLM

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA
**POPOLA FRONTO — Mar, 25, Valencia (Hispanio)**

## POPOLFRONTA LETERUJO

J. L.—Pouy.—Kore ni dankas vian leteron. Ni ricevis vian anoncitan monsendon, kiun ni kvitancas aparte. La anonceton ni publikigas. Daŭrigu vian efikan k persistan laboron. Fortan manpremon!

L. R.—Paris.—Ni ricevas regule la anglan revuon kies sendadon ni dankas. Vere vi pravis, kara k-do. Tiam ni esperis, k nun... ni ankoraŭ esperas. Tutkoran saluton.

M. R.—Paris.—Vian anonceton ni publikigas. Sincere ni dankas vian helpemon. Laboru persiste. Nuna situacio postulas ĉies klopodojn. Fratecan saluton.

M. J.—New York.—Ni notas viajn indikojn k petas la koncernajn informojn. Ni dankas vian sintenon k instigas vin al persista laboro, laŭ postulas nunaj cirkonstancoj.

K. K—Ryd.—Laŭ via peto ni sendos la gazeton. Ni ricevis la r. k. kies sendon ni dankas, kun forta emocio.

B.—Annecy.—Kun estimo k respekto ni legis vian p. k. Diversajn opiniojn ni respektoplene konsideras, sed ni ne povas agnoski noblan idealon kiel absurdan troigon. Pri la lingvaĵo, kiel vi plej bone scias, ekzistas eterna disputado; niaflanke nur ekzistas sinceraj aspiro k penado al simpligo, klareco k zamenhofa stilo. Se ni atingas aŭ ne tiun celon, ni ne povas juĝi; tiurilate ni ricevas diversajn opiniojn, sed ĉefe kun laŭdoj. Tutkore ni salutas vin.

J. W. B.—Paisley.—Kun danko ni kvitancas ricevon de r. k. Okaze de nova sendaĵo ni petas ke vi sendu ĉion al nia peranto en via lando aŭ al la ĝenerala adreso en Orleans. Koran saluton.

P. L.—Rotterdam.—Ni notis vian adresŝanĝon k komunikis al k-do Hernandez la enhavon de via letero. Li dankas k reciprokas vian saluton. Pri la cetero ni tute kunsentas k certe alvenos definitiva triumfo de niaj idealoj. Antaŭen sen hezito!

E. L. O.—London.—Sekve de viaj indikoj ni korektis eraron en via slipo. Estonte la adreso estos ĝusta. Ni dankas vian monsendon k kuraĝigajn frazojn. Ni sendos la broŝuron tuj post ĝia apero.

W. L.—Albacete.—Ni ĝojis konante vian alvenon k vian partoprenon en nia lukto. Laŭ viaj indikoj ni sendos la gazeton. Fratan saluton k bonan sorton!

G. W. D.—Victoria.—Ni dankas la enhavon de via letero k vian monsendon.

AVIZO.—Ni petas al niaj legantoj sendi la respondkuponojn al sialanda peranto aŭ al nia ĝenerala adreso: Gustave Farenc, 53 rue Brise Pain, ORLEANS (Loiret) Francio.

## KORESPONDADO

**Simpla trilinia anonceto 4 f. fr.**

HISPANIO.—Krozŝipo «Mendez Nuñez» grupo «Amikoj de Sovet-Unio», Cartagena, dez. kelektive kor. kun Sovetio.

FRANCIO.—St. Gaudens (H. G.), 20 rue Thiers, k-do Fournier interŝanĝus tutmonde ilustritajn poŝtkartojn. Belegaj Pireneaj vidaĵoj atendas vin!

FRANCIO.—Douai (Nord). En Esperanto-Unio de Sindikata domo, 49 rue Cuvelle, 30 gelaboristoj k oficistoj dez. kor. kun ĉiuj landoj, pri ĉiuj temoj. Ili respondos al ĉiu, ĝis la 15. de Majo.

SOVETIO.—A. Poloneckij, ul. 9 Janvarja 3, Voronej, dez. kor. kun tutmondo k interŝ. P. M. k I. P. Korespondas esperante, ruse k germane.

SOVETIO.—K-do Lev Djaĉkov I-J. Detskif per 2 kv. 5, Voronej Centr. dez. kor. k. ĉ. l. precipe kun Hispanio.

SOVETIO.—K-do Rjumin Boris, ul. Orĝonikidze 32, kv. 10, Voronej, dez. kor. k. ĉ. l. k p. ĉ. t.

SOVETIO.—Eŭfemo Hercberg, K. Marks 39, Voronej, 14-jaraĝa lernanto dez. kor. kun seriozaj homoj, precipe hispanoj.

SOVETIO.—D. Korobejnikov, ul. Prospekt Revolucii 4, Voronej dez. kor. kun hispanoj.

NEDERLANDO.—A. Groeneveld, Ramplaan 76, Haarlem, dez. kor. kun gekamaradoj el la tuta mondo k interŝanĝi P. M.

ĈEĤOSLOVAKIO.—Gekamaradoj, mi volus korespondi k. ĉ. l. speciale pri politiko, ekonomio k kulturo, detale pri socialisma k junulara movadoj. Sendu ankaŭ gazetojn k aliajn propagandilojn. Interŝanĝas ankaŭ P. M. Adreso: Frant. Taraba; Rajeĉko Nr. 93, p. Rajec n/Sv.

ĈEĤOSLOVAKIO.—Filatelistoj, ĉiu kiu deziras ricevi belajn ĉeĥajn P. M. skribu al Jakob Maŝtalir, Brno, Zabovreska 16.

## NIA MUNICIO

| | | |
|---|---|---|
| Valencia esperantistaro | 142 | ptoj. |
| T. M.—Callosa de Segura | 10 | » |
| E. M.—Castuera | 5 | » |
| R. S.—Callosa de Segura | 5 | » |
| H. M.—Albacete | 200 | » |
| T. B.—Barcelono | 1 | » |
| A. P—Albacete | 70 | » |
| F. H.—Albacete | 20 | » |
| V. A.—S. Clemente | 10 | » |
| S. M.—Madrid | 10 | » |
| S. L.—Albacete | 10 | » |
| F. S.—Ocaña | 50 | » |
| P. S.—Orihuela | 15 | » |
| F. G.—Godella | 2'50 | » |
| A. U. S.—Cartagena | 51 | » |
| S. M.—Ciudad Lineal | 20 | » |
| M. D'A.—Hijar | 15 | » |
| L. C.—Bazo 6.ª | 15 | » |
| R. A.—Cocentaina | 5 | » |
| FLE Sekcio 9. Rotterdam | 5 | gd. |
| E. P.—Amsterdam | 1 | » |
| G. A. v. M.—Amerspoort | 1 | » |
| I. K.—F. L. E. Sekcio 6.—Hilligersberg | 1'25 | » |
| G. J. W.—Den Haag | 2 | » |
| FLE Sekcio 10, D. K.—Amsterdam | 1'71 | » |
| A. G.—Haarlem | 1'50 | » |
| P. G. D.—Amsterdam | 0'50 | » |
| FLE Sekcio I.—Amsterdam | 0'50 | » |
| F. v. d. M.—Utrecht | 2 | » |
| H. A.—Utrecht | 1 | » |
| Lab. Esp. Klubo. Boras | 35 | sv.kr. |
| R. L.—Stockholm | 2 | » |
| T. H.—Vingaker | 2 | » |
| H. L. k A. B. Vasteras | 3 | » |
| J. B.—Umea | 5 | » |
| Esperantistoj en Kiruna | 8 | » |
| H A.—Drev | 3 | » |
| G. C.—Visby | 5 | » |
| Ch. O.—Goteborg | 2 | » |
| P. H. R.—Karlstad | 2 | » |
| G. P.—Karlstad | 2 | » |
| E. H.—Karlstad | 2 | » |
| J. R. H.—Goteborg | 25 | » |
| A. A.—Molulycke | 2 | » |
| O. J.—Molulycke | 2 | » |
| A. J.—Molulycke | 2 | » |
| E. J.—Molulycke | 2 | » |
| T. A.—Vaasa | 5 | » |
| Dek k-doj el Atvidaberg | 10 | » |
| G. A. K.—Vetlanda | 2'50 | » |
| G. N.—Stockholm | 10 | » |
| A. L.—Kungsor | 5 | » |
| J. J.—Nordmaling | 5 | » |
| B. H.—Vaasa | 4 | » |
| FETT-anoj en Kiruna | 3 | » |
| A. Z.—Stockholm | 5 | » |
| G. M.—Malarhojden | 5 | » |
| A. G. Traneberg | 5 | sv.kr. |
| G. S.—Karlskrona | 2 | » |
| A. A—Alingsas | 2 | » |
| G. K.—Koping | 5 | » |
| S. G.—Vasaijaure | 4'30 | » |
| A. O—Trelleborg | 5 | » |
| P. Th.—Beautheil | 10 | ffr. |
| R. V.—Trainou | 10 | » |
| J. Esperanto.—Fecamp | 26 | » |
| Gr. Esp. Ouvrier.—Orleans | 2'50 | » |
| J. N.—Libereco | 50 | » |
| C. P.—Vaulx en Velin | 10 | » |
| D.—Somain | 20 | » |
| S.—Fez | 25 | » |
| I. L.—Bihovel | 10 | » |
| A. L.—Petite Foret | 20 | » |
| E. S.—Slezku | 52'08 | » |
| F. G.—Dammarie s/ Loing | 15 | » |
| I.—Cholet | 5 | » |
| R.—Cholet | 5 | » |
| G. Cholet | 2'50 | » |
| J. L.—Vitry aux Loges | 50 | » |
| A. J.—Montdevergnes | 24 | » |
| M. B.—Orleans | 6 | » |
| G. S.—Tours | 15 | » |
| J. M.—Tours | 10 | » |
| P. B.—Kratzan | 24'21 | » |
| R. E.—Skutskar | 21 | » |
| M. L.—Palaiseau | 10 | » |
| A. C.—Dunkerque | 10 | » |
| Esp. Rondo Lab.—Chicago | 7'50 | dol. |

Presejo de J. Olmos, Alicante, 53, Valencia